

# Pola Esperantisto Esperantysta Polski

XXXII JARO

NRO 7

JULIO 1938

ELDONANTO — WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ — REDAKTORZY

PROF. DR ODON BUJWID — MGR TADEUSZ HODAKOWSKI

Aperas la 20-an de ĉiu monato. Redakcian materialon oni petas sendi ĝis la 10-a de ĉiu monato. La redakcio estas rajtigita laŭ bezono ŝanĝi la tekston de manuskriptoj.

## VIII POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO EN KRAKÓW.

**L**a nunjara Pollanda Kongreso ne okazis, kiel kutime, dum Pentekosto, sed iom pli malfrue, nome la 18-19 an de junio. Pro teknikaj kaŭzoj PED ne povis okazigi la Kongreson dum Pentekosto kaj tio parte estis kaŭzo de la malmultnombro de la partoprenantoj. La Esperantistoj estas plejparte homoj, okupitaj en regnaj aŭ privataj oficejoj kaj entreprenoj. Tial ili povas partopreni Kongreson nur dum festotagoj. Estus do tre dezirinde, ke PED estonte revenu al la tradicia tempolimo de niaj pollandaj Kongresoj, nome al la Pentekosto.

Estis cetere ankaŭ aliaj kaŭzoj de la malmultnombro de la kongresanoj. Sed pri ili ni parolos pli poste.

Malgraŭ la granda partoprenantaro la Kongreso tute serioze laboris. Ni ne estos tro memfidaj, se ni simple konstatos, ke ĝi estis multe pli serioza, ol niaj lastaj Universitaj Kongresoj, dum kiuj oni entuziasme aplaudas al ĉiuj por kaj kontraŭparolantoj kaj akceptas ĉiajn rezoluciojn, eĉ ne aŭdinte bone ilian enhavon.

Se ĉiu medalo havas du flankojn, tiam la malmultnombro ankaŭ havas sian bonan

econ. Ĝi helpas al pli serioza laborado, ĝi devigas la kongresanojn memori pri ilia respondeco.

La Kongreson antaŭiris vendrede la 17-an de junio la kutima „Interkonatiĝa vespero“, dum kiu la kongresanoj kun la krakovaj gesamideanoj pasigis kelkajn agrablajn horojn.

La Kongreso mem komenciĝis sabate matene en la belega ejo de la Industria Muzeo, jam delonge fariĝinta nia konstanta kongresejo dank' al la gastama afableco de ĝia direktoro ing. Eugeniusz Tor, nia fervora samideano.

La kongreson malfermas la prezidanto de Pollanda Esperanto-Delegitaro prof. dro Odo Bujwid, bonvenigante la kongresanojn kaj dezirante sukceson al la Kongreso. Post tio li transdonas la prezidon al la viceprez. de PED dro Leon Rosenstock.

Poste sekvas la kutimaj salutparoladoj. La kongresanoj, reprezentantaj la Esperanto-grupojn de niaj lokoj salutas en ties nomo la kongreson. En la nomo de Internacia Esperanto-Ligo salutas ĉefdelegito ing. Chmieleński, varbante ankaŭ por la Londona Kongreso. En la nomo de Universala Espe-

ranto. Aŭocio salutia la Kongreson ĉefdelegito red. Šapiro, substrekte, ke, malgraŭ la diversaj malhelpoj UEA en Ĝenevo laboras kaj restis fidela al la noblaj ideoj de la Majstro.

### Raportoj de lokaj grupoj.

Delegitoj de lokaj grupoj raportis pri la agado de la grupoj Esp. dum la pasinta jaro. Parolis i. a. reprezentantoj de Białystok, Bielsko, Kraków, Lwów, Łódź kaj Warszawa.

Raportoj de diversaj lokoj enhavis interesajn detalojn. Pro malsameco de lokaj kondiĉoj diversaj metodoj estis aplikitaj. La raportado dum la landa Kongreso estas tre utila, ĉar ĝi ebligas al la agantoj interŝanĝi komunajn apertojn kaj lerni unu de alia.

### Eĥoj de la Jubilea Kongreso.

Poste la Kongreso pritraktis la aferojn,igitajn kun la pasintjara Jubilea Kongreso en Warszawa.

La kasiisto de la Jubilea red. Stefan Lubliner donis financon raporton pri la Kongreso, kontrolitan de la revizia komisiono de Pollanda Esperanto-Delegitaro. Pro la konataj bedaŭrindaj okazintaĵoj en la Esperantujo,igitaj kun la organiza disputo inter la t. n. ĉefuloj de la tutmonda movado, la Jubilea Kongreso ne havis tian nombron da kongresanoj, kiun ĝi estis meritinta. Malgraŭ ŝparema mastrumado, la Kongreso kaŭzis deficiton. Nun estas devo de la tutmonda Esperantistaro, i. a. ankaŭ de la pollanda, helpi al la Loka Kongresa Komitato kovri tiun deficiton.

Je demando de «ro Chmieliński, kiel estis solvita la afero pri t. n. „kongresa licenco“ (pago de procentaĵo al la centra Esp. organizo) red. Lubliner klarigas, ke la licenco estis laŭinterkonsente dividota egalparte inter UEA kaj IEL. Pro la kongresa deficiito UEA rezignis de sia licencparto favore al la kongresa kaso. IEL rifuzis rezigni malgraŭ la peto de la kongresa komitato. Tamen fine la afero estis ordigita tiel, ke ĝen. Bastien en sia propra nomo donacis al la kongresa kaso sumon, kiu parte kovras la truon, kaŭzitan pro la pago de la licenco al IEL.

Post akcepto de la financa raporto la Kongreso aŭskultis detalan refaraĵon de red. Šapiro pri „La Jubilea kaj ĝia sekvoj por la tutmonda kaj pollanda Esperantomovadoj“.

La referanto, bazante sin sur oficialaj dokumentoj, devenantaj ne nur de la Esperantaro, sed ankaŭ de la regnaj instancoj, tuis i. a. kelkajn vese bedaŭrindajn kaj hontigajn faktojn, rilatantajn al la Jubilea Kongreso. Parolante pri tiuj aferoj, kiuj estis ĝis la Kongreso konataj nur de la

gvidantaro de P. E. D., red. Šapiro videble penia ne nur estis severe objektiva, sed ankaŭ ne diri ion pli, ol tio rezultas el oficialaj, nekontesteblaj dokumentoj.

Li menciis i. a. la grandajn malfacilaĵojn, kiujn havis la organizantoj de la Jubilea Kongreso de Esperanto. Tiujn malfacilaĵojn faris al la organizantoj ne la registaro kaj la urbaj aŭtoritatoj. Tiuj ja plene morale kaj finance subtenis la Kongreson. Bedaŭrinde, la malfacilaĵojn faris la Esperantistoj kaj eĉ — kio estas des pli bedaŭrinda — tiuj, kiuj gvidas la movadon. Nur dank' al la prudenta sinteno de la Esp. Naciaj Societoj f. E. L. fine konsentis subskribi interkonsenton kun la Loka Kongresa Komitato, ke la Kongreso estos sendependa de IEL kaj UEA.

Kiam fine tiu baro estis forigita, estis jam sufiĉe malfrue. Por kongresa propagando, retenita en iuj Esperanto-gazetoj, ne povis jam doni decan rezulton.

Sed tio ne estis fino de la dorna vojo de LKK. Antaŭ la Kongreso niem subite ekpluris per aro da artikoloj kontraŭ la Kongreso kaj ĝiaj organizantoj en granda parto de pola gazetaro. La artikoloj daŭris ankaŭ dum kaj post la Kongreso. Ili enhavis plej akrajn akuzojn kontraŭ Esperanto, kontraŭ la Kongreso kaj ili prezentis la LKK-anojn ne nur kiel danĝerajn kontraŭŝtatojn, sed ankaŭ kiel simplajn krimulojn.

Rimarkinde estis, ke la verkintoj de la artikoloj bone konis la Esperantan movadon, sed nur malhonvole kaj intence aligis diversajn detalojn por fari sian malindan laboron kontraŭ nia Kongreso.

Kiu iniciatis tiun kruciron kontraŭ la Esperantistoj? Kiu deziris la malsukceson de la Kongreso kaj kiu arde celis, ke la fervoraj kongresorganizantoj estu suspektitaj kvazaŭ simplaj krimuloj?

La faktoj, kiujn la referanto citis laŭ oficialaj dokumentoj, ne lasas ian-ajn dubon pri tio. La ĉefiniciatinto ne estis iu kontraŭulo de nia movado, sincere kredanta, ke ni estas danĝeruloj. La ĉefiniciatinto estis homo, nomanta sin Esperantisto kaj devenanta de niaj vicoj.

Tio estas nun jam fiksita de la koncerna instanco. Li ne nur incitis la gazetaron kontraŭ ni, sed ankaŭ denuncis la komitatanojn de la Kongreso al regnaj aŭtoritatoj. Fotografajo de tiu glora verkaĵo, troviĝanta en la dika aktaro de la referanto, ne lasas ian-ajn dubon pri tiu fakto.

Komprenoble, post severa esploro la juĝepluraj instancoj nuligis la sensencajn akuzojn, liberigante la LKK-anojn de ĉia suspekto. Ankaŭ pri tio estis cititaj la koncernaj oficialaj decidoj.



Bedaŭrinde, la prikongresa raporto en la oficiala organo de IEL estis tendenca kaj maljusta kontraŭ la organizintoj, havintaj tiom da malhelpoj kaj malagrablaĵoj. La korespondanto de „Heroldo“ skribante pri la malfavara sinteno de pola gazetaro, asertis, ke tiu sinteno tuj ŝanĝiĝis je favora dank' al... tiu sinjoro, kiu estis la ĉefiniciatinto de la atakoj. La korespondanto de „Heroldo“, oficiala kongresraportinto, ne nur laŭdis la denuncinton, sed ankaŭ subtenis liajn akuzojn per siaj eldiroj dum la juĝ esploro.

Tiel aspektis la aferoj en Esperantujo okaze de la duonjarcenta jubileo de Esperanto.

Fine la referanto tuŝis la tre gravan problemon de la Interŝtata Esperanto-Akordo, pritraktitan dum la Jubilea. Li rakontis pri la sindona, trankvila kaj senrekla laboro de la komisiono por tiu afero dum pasinta jaro. Granda danko estas ŝuldata ĉefe al «-roj Dro Czubyński, Klimceki, sino Cenne, kiuj oferis multe da tempo kaj laboro por

fari tion, kion ne scipovis plenumi la gvidantoj, okupitaj per organizaj disputoj. Klarigaj leteroj kaj vastaj referaĵoj, disenditaj al la registaroj de ĉiuj regnoj, estis nur parto de la farita laboro. Nur malmultan helpon ricevis la komisiono. LKK helpis laŭpove. UEA ankaŭ kunhelpis, i. a. disponigante lokon en sia organo „Esperanto“. IEL ne montris sufiĉan komprenon por la afero. Ĝia organo tamen presis iom pri tiu demando.

Nun post jara laborado la komisiono prezentos sian raporton al la Londona Kongreso. Vidante la organizan duecon, la komisiono ne supozas, ke tiun laboron transprenos sukcese unu el la ekzistantaj centroj. Tial devas esti kreita speciala instanco nur por solvi tiom gravan kaj esencan problemon, kia estas la enkonduko de nia lingvo en la lernejojn. Tiu instanco konsistu el reprezentantoj de IEL, UEA kaj de la tuku asocio TAGE.

(daŭrigota)

## GRAVA MISKOMPRENO.

**K**vindek jaroj de Esperanto-movado estas jam malantaŭ ni. Kvindek jaroj de batalado pri nia ideo estas ruliĝe longa tempospaco por povi starigi kaj solvi la demandon, ĉu ni transpaŝis la sojlon de la dua duono de jarcento kiel venkintoj?

Se ni penetros kaj konsideros la akiritajn rezultojn, ni respondos jese, ne hezitante eĉ unu momenton. Ni konkiris do per nia lingvo la tutan mondon. Tamen en tiu venko estas unu tute ne malgranda „sed“. En la konkirita mondo ni nek fortigis, nek konstantigis niajn influojn. En ĉiu ŝtato flirtas vere la verda standardo, sed la taĉmento de marŝantoj post ĝi estas tre malmultenombra. Ili estas, super ĉia dubo, la homoj ideoplenaj, elprovitaj... sed for la patoson! En kio kuŝas la kaŭzo, ke ni estas tiom malmultaj? En grava, tragedia miskompreno.

Estas homoj, kiuj suspektas nin esti la propagandantoj de tiu ĉu alia ideo politika, danke al nia lingvo internacia. Tiuj homoj ne estas pravaj, ĉar farado de tiaspacaj ri-proĉoj al esperantismo estas simila al batalado kontraŭ radiofonio, kiu ankaŭ trastrekis praktike la limojn de l' ŝtatoj kaj fariĝis la tutmonda interkomunikilo. Ni observas ĉi tie klasikan ekzemplon de l' intermiksado de l' ideoj pri celoj kaj iloj.

Estas aliaj medioj sociaj, al kiuj ni fariĝis salo en okuloj pro tio, ke ni celas elstreki kaj forigi el socia lingvo la malgloran kaj hontindan proverbon „homo homini lupus“, kaj ke ni enskribis sur niaj standardoj profundsencan, sanktan signalvorton - La Paco.

Ĉi tiuj niaj kontraŭuloj penas insinui kaj konvinki la sen- aŭ malmulte kritikajn homojn, ke ni estas siaspeca mistera, sekreta sekto, eĉ preskaŭ framasonaro, ke ni, subigante al tendencoj de false komprenata pacifismo, estas socie malutilaj kaj kontraŭbatalindaj el la vidpunkto de l' ŝtata profito. Ili asertas kaj celas sugestii al la socio la diversajn sensencaĵojn, ke ni interligas per juro eviti la militervon, laŭeble neniam preni karabon en la manojn, dum la milito forĵeti la batalilojn k. t. p.

Nenio pli malprava kaj malĝusta!

Male, ni esperantistoj, en hodiaŭaj kondiĉoj politikaj rekonas la armeon kiel unu el ĉefaj faktoroj de la ŝtata racio de l' ŝtato. Precipe ni, pola esperantistaro estas fieraj, ke en niaj vicoj sin trovas nia ministro de militaj aferoj kun ora Jubilea Stelo sur la brusto.

La militservon ni traktas nia plej alta devo civitana, kaj en la kazo de milito ni ĉiuj estos pretaj per nia sango kaj vivofero pruvi la amon al la patrujo.

La esperantismo ne trastrekas la patriotismon! Ĝia pacifismo ne estas false komprenata; ĝi elkreskas sur la kanvaso de l' aktuala kaj doktrino pri neceso kaj bezono de historia, intersocia kaj internacia justeco, el amo al la homaro. Tia estas kaj restos por ĉiam la „credo“ de l' esperantismo.

Disblovi kaj forigi la antaŭjuĝojn, ke la esperantismo sindonis al la servo de politikaj direktoj kaj doktrinoj, fariĝinte la propagandilo de la politiko, ke per la mallarga

pacifismo ni, esperantistoj, estas malutiluloj kontraŭ la socio kaj ŝtato, jen estas niaj ĉefaj devoj, celoj kaj taskoj. Venkinte tiujn antaŭjuĝojn kaj malpravajn pri ni opiniojn ni trafos en la socion, estos rekonitaj de ĝi, enkondukos kun pli granda facileco nian lingvon en lernejojn, disvastigos niajn ideojn, plifortigos niajn influojn.

Kaj tiam - kiu scias, ĉu niaj signaldiroj pri pacifismo ne fariĝos esence la realaĵo, ĉu ili ne anstataŭos la kanonojn, kartoĉojn kaj mortigajn gasojn? Oni devas tamen konfesi, ke tio ĉi estas la muziko de, bedaŭrinde, ankoraŭ tre malproksima venonteco.

*Fr. Zontek.*

## „KRAKOVAJ TAGOJ“.

Ĝis nun ankoraŭ neniam havis la pola esperantistaro tiel bonegan okazon viziti Krakovon kiel nun dum la „Krakovaj Tagoj“...

Kraków, antikva pola ĉefurbo, arangis gradiozan feston por doni al Pollandanoj kaj fremduloj eblecon renkontiĝi kun plej noblaj akiraĵoj de la pola kulturo sur ĉiuj kampoj. Ne ekzistas en Pollando pli konvena loko ol Kraków, urbo de Stwosz kaj Kopernik, Matejko kaj Wyspiański por arangi tiel gravan por la propagando de la pola kulturo, solenan feston. Alten suprenleviĝis la turoj de S-ta Maria preĝejo, jam de malproksime salutante la alvenintojn. Vespere lumiĝis la ora krono de la turo, kaj al ĉiuj direktoj de la mondo sonis la plej bela signalo de la vivanta nacio, kiu preskaŭ fariĝis dua himno nacia de Pollando. Malnovaj muroj alparolis la alvenintojn per siaj legendoj, kanto kaj muziko. Grandajn arteriojn de la urbo plenigis pitoreskaj popolamasoj, fluante al la koro de la urbo, al la antikva ĉefplaco.

Esperantaj gastoj havis okazon admiru la tradicion „Florkronan feston“, Vistulon lumigitan per centoj da multkoloraj raketoj kaj artaj fajroj. Vespere efektplena iluminado de la plej belaj partoj de la urbo, de plantejoj kun ŝprucfontano faris iluzion de iu fabela lando el mil kaj unu noktoj, permesante por mallonge forgesi pri mizeroj kaj zorgoj de ĉiutaga vivo. Per granda Festo de la kanto oni malfermis la „Krakovajn Tagojn“. Inter antikvaj reĝaj muroj fluis la muzikaj tonoj, ligante ĉiujn korojn en konkorda laboro, celanta potencon kaj gloron de nia Patrujo. Okazis Festivalo de la arto, donanta okazon prezenti la perlojn de teatra, plastika kaj literatura artoj.

Tiuj vesperoj ilustris perfekte la disvolviĝon de la nuntempa pola verkado sur kampoj de poezio, humoro kaj publicistiko. Okaze de Kristkorpa Tago, la plej solena katolika festo, Kraków, fariĝis kvazaŭ unu granda preĝejo, kies arkajon formis la ĉielo...

Kraków, pola Romo, havis ankaŭ dum tiuj „Krakovaj Tagoj“ kiel unua el la polaj urboj okazon homagii antaŭ la relikvoj de nova Sanktulo, Andreo Bobola, apostolo de la pola kulturo kaj Kredo, kies sanktaj restaĵoj revenis el Romo al Pollando, por resti por ĉiam en la Patrujo... Samtempe estas Krakovo ankaŭ la pilgrimejo de ĉiuj polaj civitanoj, kies sankta deziro estas homagii antaŭ la Tombo de nia Granda, neforgesebla Marŝalo. Tial Krakovo estas la celo de multaj ekskursoj el ĉiuj partoj de Pollando kaj eĉ el malproksimaj landoj.

Krom tio ĉi alveninto havis okazon trovi tion, kio plej multe interesis lin, komencante de grandaj, simfoniaj koncertoj sur Wawel, plej bonaj teatraj prezentadoj kun fama Solski, pentrekspozicioj en artpalacoj kaj sub la malnovaj fortikaĵturoj de „Floriana Pordo“, historiaj kaj popolaj festoj, kiel „Krakova Edziĝfesto“ en Barbakano, kaj „Lajkonik“, memore al la liberigo de la urbo for de la Tataroj. Dum bruo de kaldronoj kaj tonoj de janiĉara orkestro aperis minaca Tataro sur ĉevalo... kaj la „Pafista Reĝo“ ĉirkaŭnata de siaj korteganoj, en riĉaj, mezepokaj vestaĵoj aspektis kvazaŭ vivanta vizio el mezepoka jarcento... Dank al „Krakovaj Tagoj“ Krakovo fariĝis centro de pola kulturo simile kiel Salzburg por la germana kulturo.

*N. Dattnerowa.*

## RESUMOJ EN ESPERANTO.

Unu el la plej bonaj propagandrimedoj por Esperanto en intelektulaj rondoj konsistas en la iniciato alprenita de jam pluraj nacilingvaj fakperiodaĵoj: aldoni al siaj ĉefaj artikoloj pli malpli ampleksan resumon en la internacia helplingvo. Tiu ĉi diskreta kaj, pro sia reguleco, insista altrudo nesentible sugestas al la legantoj kreskantan komprene-

menon pri la utileco de Esperanto kaj iom post iom vekas aktivan intereson pri ĝi — ĉefe se multobliĝos tiuj mutaj varbadoj en kiel eble plej multaj gazetoj kaj revuoj.

Alia tereno por simila agado troviĝas en la multflanka scienca faklibraro, kiu ĝis nun estis preskaŭ tute neglektita por ĉi tiu celo. Por plenigi tiun mankon ni kreis Bibliogra-



fian Servon per Esperanto, celante precipe la fralingvajn regionojn, kiu funkcias proksimume laŭ la jena principo:

Ni petas al scienca verkisto aŭ al lia eldonisto fralingvan resumon pri verko, kiun li nuntempe preparas, aŭ kiu aperis antaŭ nelonge;

Tiun resumon ni zorgas tradukas en Esperanton kaj, laŭ reciproka interkonsento, aŭ rekte resendas ĝin al la aŭtoro, aŭ akceptas mendon presigi ĝin ĉe unu el niaj presistoj, je la laŭnecsa libroformato. Se la libro jam estis presita, la resumoj estos gluitaj kiel aldonajo en la tutan kvanton de la restantaj, vendotaj ekzempleroj;

Ni invitas la aŭtoron sendi recenz-ekzemplerojn al la ĉefaj Esperanto-periodaĵoj, kies adresojn ni tiucele konigas al li;

Dank'al la Esperanto - resumo la verko estos konigata per recenz-artikolo al la tutmonda esperantistaro. Interesitaj samideanoj konantaj aŭ ne la original-lingvon de la libro facile kaj rapide povos havigi ekzempleron al si, kaj ĝi estos valora pruvo pri la praktika utilebleco de nia lingvo;

Aktivaj samideanoj el ĉiuj landoj, kiel eble spertaj en la scienca fakliteraturo, estas petataj redakti en siaj respektivaj naciaj lingvoj mallongan informon pri la koncerna libro (karakterizita per sia Esperanto - resumo!) kaj sendi ĝin, kun publikig-peto, al la tiurilataj fakrevuoj de sia lando. Per tiu rimedo la verkaĵo estos rapide diskonigata tra la tuta

mondo, kaj la ofta mencio de Esperanto agos kiel valora propagandfaktoro por nia movado. (Noto: Estas konsilinde krei reton de konstantaj kunlaborantoj seriozaj, kaj ni petas agemajn samideanojn el ĉiuj mondpartoj sendi siajn adresojn al Servo Bibliografia Scienca per Esperanto, 11 rue Poupin, Metz-Montigny, Franclando.)

Ni sendis al la plej gravaj Parizaj eldonejoj kaj konataj francaj sciencfakaj verkistoj detalan cirkuleron pri la organiza de nia Servo, kaj ni estas ricevintaj aron da promesplenaĵoj respondoj kaj jam plurajn mendojn por resumo-tradukoj. La unua libro, kiun ni prezentos laŭ la dirita maniero, estos la grava verko de L. Elbe: La moralkrizo antaŭ la moderna scienco.

Estus dezirinde, ke el aliaj landoj, precipe en malgrandaj (komparu: «Ĉu Esperanto servas al malgrandaj popoloj?» en Heroldo n-ro 964!) ekfunkciu similaj bibliografiaj servoj kiuj, interrilatante, povus reciproke kunlaboradi kaj interkonsiliĝi.

*Esperanto helpu al la scienca faklibro, la scienca faklibro helpu al Esperanto — jen estas nia devizo!*

*Albert Lienhardt.*

P.S. La subskribinto petas bv. sendi al li la titolojn, kun nomoj de aŭtoroj kaj adresoj de eldonistoj, de nacilingvaj verkoj kiuj estas ĝis nun publikigitaj kun resumo en Esperanto.

## MIAJ IMPRESOJ.

Antaŭ ĉio mi volus prezenti min al la estimataj samideanoj, kiel juna esperantisto, kiu unuafoje volas preni voĉon en nia fakorgano. Antaŭ du jaroj ankoraŭ mi estis laiko en la esperanta movado kaj sciis nenion pri Esperanto. Gis... hazarde mi ekvidis esperantan vortaron, kaj...

Sed mi devas mencii, kiel okazis ĉi tio. Iun tagon mi, kiel policisto, devis viziti serve iun suspektitan komuniston, kie mi trovis la vortaron. Leginte kelke da paĝoj, mi ekinteresigis pri ĉi tiu lingvo, kaj post nelonge mi jam havis propran vortaron. Mi komencis lernadon sen helpo de iu instruisto, ĉar tie, kie mi servis, estis nur unu esperantisto, nome: tiu komunisto! Kompreneble, ke mi kiel policisto, ne povis profiti de lia helpo. Pro tio mi fariĝis memlernanto!

Iom post iom mi progresis en la lernado kaj poste tute mi infektiĝis de la „internacia verda malsano“... Antaŭ miaj okuloj mi vidis larĝegajn horizontojn de la grandegaj profitoj, kiujn povas doni la Esperanta lingvo! Malgraŭ, ke mi havis neniun interkon-

takton kun la tutmonda Esperantistaro, mi jam komprenis, ke Esperanto estas la plej genia interkomprenilo de la homoj en la tuta mondo. Kaj mi ankoraŭ ne povis kompreni, kial ĝi ne estas instruata en lernejoj? Kial oni devas lerni francan, germanan, aŭ anglan lingvojn, kiuj estas ege malfacilaj, se oni povas pli facile anstataŭi tion per Esperanto...

Mi ne sciis tion tiam, antaŭ du jaroj, sed... nun mi iomete scias! Mi eksciis ĉi tion kaj dekovris fonton de abomeno, kiun sentas malsaĝaj kontraŭuloj de Esperanto:

— Esperanton kreis Zamenhof, kiu estis judo!...

— Insigno de Esperanto estas kvinpinta stelo, kiun havas bolŝevikoj!...

Jen estas riproĉoj de niaj kontraŭuloj!

Mi respondis al ili tiamaniere:

— Sinjoro, vi estas katoliko? Kial? Ja Jesuo Kristo ankaŭ devenis de judoj! Ĉu vi pro tio malkredas, ke Jesuo Kristo ne estis vera Dia Filo?...

Koncerne al la dua riproĉo, mi opinias, ke laŭ via opinio, ĉiuj niaj oficiroj devas esti

„holŝevikoj“, ĉar ĉiu el ili portas kvinpintajn stelojn sur la epoletojn!...

Mia kontraŭulo nenion respondis, kaj foriris!... Diskuto estis finita!...

Sed mi ne malĝojis! Nelonge poste, mi komencis korespondadon kun kvin policistoj el Nederlando. La korespondado konvinkis min, ke Esperanto vivas kaj per longaj paŝoj kuraĝe iras tra la mondo. En Nederlando ekzistas eĉ polica Esperanto - Unuiĝo, kiun partoprenas proksimume 100 policistoj, kaj ĝi eldonas propran polican Esperanto-revuon s. t. „Monata Polica Bulteno“. Krom tio ĉiujare la policiistoj aranĝas specialajn esperantajn kursojn, parolajn kaj perleteraĵojn! Kiel oni informis min, nelonge verŝajne estos organizita „Internacia Polica Esperanto-Unuiĝo“, pri kiu klopodas nederlandaj policistoj-esperantistoj.

Estas do nova espero, ke anaro de Esperanto pligrandigos sian rondon por venke marŝadi tra la mondo!

Bedaŭrinde nur, ke Polujo, kiu estas lulilo de Esperanto, dormas ankoraŭ!...

Pri ĉi tio oni povos konvinkiĝi, ne nur el ĉiutaga vivo. Sed ankaŭ... el nia revuo „Pola Esperantisto“... Depost ĝia aranĝo, dum tri-dek jaraĵoj, ĝi jam devus esti ne monata, sed semajna, pli ampleksa revuo, ol ĝi nun estas! Sed ne malfacile estas ekkompreni, ke ĉi tio dependas de nombro da legantoj kaj ĝiaj abonantoj. Zamenhofa ideo vivas, sed grandparte eksterlande! Kiam mi pensus pri ĉi tiu bedaŭrinda fakto, rememorigas al mi malĝoja proverbo: „Neniu estas profeto en propra lando“...

Sed... „vivantoj, ne perdu Esperon!“ - kiel diris Slowacki. Venos tempoj, kiam la homaro komprenos, kaj ĝuste taksos la laŭdindan agon de la Homo, kiu ekamis ĝin. La glorinda Ideo ne povos pere!

Karaj samideanoj! Mi kiel nova via partiano salutas vin, kaj deziras al vi bona sukceson dum laboro sur la „verda kampo“!

*Jan Daszkiewicz.*

## LEGENDO.

Estis varmega julia tago en la jaro 1919. Marŝaledzino Piłsudska kun siaj filinoj Vanda kaj Jagoda pasigadis la tempon en vilao en Piaseczno - apud Warszawa. La fama dometo en Sulejówiek tiam ankoraŭ ne ekzistis.

La Komandanto ĉiusemajne sabate sin liberigadis de sia malfacila laborado kaj veturadis per aŭto al sia familio por ripozi dimanĉon.

Plenumante tiam la devojn de adjutanto kaj de persona sekretario de Marŝalo Piłsudski mi forveturigadis lin al Piaseczno kaj lunde matene mi akompanis lin en reveno al Varŝavo.

Iun lundan matenon, malfruiĝinte iomete, mi veturis al la Komandanto. La julia suno alte levigis kaj varmigis terure. Estis unu el tiaj tagoj de senĉesu sekeco, kiam la suno ŝajne eĉ nokte ne dormas, sed malaperas nur por mallonga tempo por ree sekigi la mondon, malvarmigitan de nokta roso.

Sidante en fermita aŭto, mi estis laca pro varmego kaj ordonis al ŝoforo veturi pli malrapide sur trua vojo de postmilita ŝoseo en direkto de Piaseczno. Dekstre kaj maldekstre estis malplene - nek domo, nek kabano - oni vidis nur sekigitajn herbejojn kaj ŝtonigitajn kotoĵojn - kaj nenion plu. Veturante malrapide, mi rimarkis, ke ni alproksimiĝas al iu virino, fleksiĝanta sub granda pezo, direktanta sin samdirekten, kiel ni.

Apenaŭ ni preteriris ŝin, granda komputo vekigis en mia koro, mi haltigis la ŝoforon kaj ordonis al li reiri. La virino estis vilaĝanino. Mi eliris el la aŭto, helpis al la mirigita virino enigi la pakajojn en aŭton, poste mi loĝigis ŝin en la mezo de la aŭto, sidigis ŝin sur la loko de la Komandanto kaj mi veturis pluen; ŝi - direktis sin ankaŭ al Piaseczno.

Si estis tipa vilaĝana virino, eble kvardek-kvinjara, mizerulino, ŝvitkovrita pro varmego kaj laciĝo.

Ŝi rakontis al mi, ke ŝi estas el ĉirkaŭaĵo de Piaseczno kaj revenas de sia filo k. t. p. Por trankviligi la virinon, kiu eble ne vidis ankoraŭ belforman militiston, polan uniformon, ornamitan de argentaj epoletoj kaj kiu estis konsternita pro neatendita okazintaĵo, sin trovinte en hela kaj komforta aŭto, en kiu ŝi neniam en sia vivo veturis, mi klarigis al ŝi, ke la aŭto apartenas al la Estro de Pola Ŝtato Jozefo Piłsudski mem, kies adjutanto mi estas - mi aldonis, ke li estas tre bona, homama kaj li ne koleros, ekscinte ke ŝi sidis sur lia loko.

Mi rimarkis, ke la virino, aŭskultante tiun ĉi strangan, nekredeblan historion, dufoje faris krucosignon sur si.

Kiam ni alvenis al Piaseczno, mi kvazaŭ al grandsinjorino, helpis al ŝi eliri el la aŭto, kun ĝusta eleganteco de adjutanto el Belvedero - kaj serveme eliginte ŝian pakajojn sur teron, mi ekiris al la vilao de sinjorino Marŝaledzino. Rerigardinte, mi vidis mian



kunvojaĝantinon, staranta ĉiam sur la sama loko kaj rigardanta nian malproksimiĝantan aŭton.

La Komandanto atendis jam malpacience sian malfruiĝintan adjutanton, sidante sur verando kun Marŝalino kaj kun ambaŭ filinoj.

Post unu momento ni adiaŭis kaj estis en revena vojo. Malgraŭ netorelebla varmego kaj nia malfruiĝo, li estis bonhumora, do, kiam ni estis jam for de Piaseczno, mi rakontis pri mia hazarda pasaĝerino. „Vidante ŝian laciĝon, mi volis helpi al la virino kaj mi sidigis ŝin an aŭton de ŝtatestro - ŝajnas - estas en tio nenio malbona, sinjoro Komandanto? - Kompreneble, vi faris tre bone, mia infano.

Kelkajn minutojn ni veturis en silento, poste pensigite kaj ridetante la Komandanto diris: „Tio estas tre amuza kaj estas en ŝia mizera, griza vivo grava okazintaĵo. Post jaroj, jaroj, eble el tio ĉi elkreskos legendo.

Kiam ŝi havos nepojn kaj pranepojn kaj estos duone jam infaniĝinta, ŝi rakontos dum

griza horo al sia pranepino: „Mi estis tiam juna kaj bela. Mi iris, mi memoras, grandan vojon el Varŝavo al Piaseczno. Varmegan kaj sekan someron donis dio al homoj pro iliaj pekoj - la krevita tero preĝis pri pluvo, sed ĝi ne venis. Do mi iras al Piaseczno, kaj portas pezan pakajon de mia filo Wojtek - estas tia varmego, ke estas malfacile spiri kaj mi havas ankoraŭ tian longan vojon - mi pensas, ke eble traveturos ia veturigilo, eble bonaj homoj kunprenos min, sed oni neniu vidis kaj mi apenaŭ jam iras. Kaj subite kvazaŭ el sub tero, kvazaŭ el ĉielo iranta ora kaleŝo haltis, eliris el ĝi kavaliro el Belvedero kun argenta armilo kaj tre bela kaj gentila. „De kie vi iras, Katarino kaj kien? Mi forkondukos vin“.

Li demetis oran ringon el sia fingro kaj metis ĝin sur la mian kaj diris: k. t. p.

Jen tiamaniere naskiĝas naciaj fabeloj kaj legendoj“ finis kun rideto la Komandanto.

El la pola lingvo tradukis

*Anna Weinstein.*

## EL LA AŬSTRALIA LITERATURO.

### UNU PLENPLENA HORO.

De Profesoro Walter Murdoch.

**L**a 30-an de marto 1778 okazis grandega lekscito en Parizo, la plej ekscitiĝema urbo en la mondo. Jam de longaj jaroj tian kirliĝon oni ne vidis, tian zumon, tiajn vivuantajn svarmojn en la stratoj, havis tian fortan senton, ke gravaj eventoj disvolviĝas. „Gi estas la lasta granda publika bruo en Parizo sub la malnova reĝimo“, skribis Lord Morley. „La sekventa granda bruo, kiun devas kroniki la historiisto, estas la ĉiam neforgesebla dek-kvara tago de julio dek unu jarojn poste, kiam falis la Bastilo, kaj komenciĝis por Francujo ordo nova kaj por tuta Eŭropo novaj problemoj“. Pro kio la homamasojn tiel tumultis tiu lekscito, kiun eĉ tiel sobra verkisto kiel Lord Morley komparas kun la lekscito kaŭzita de tiu mondskua faro - la renverso de la Bastilo?

Se hazarde vi estus troviĝinta en Parizo tiun tagon kaj starus ie inter la Académie kaj la Comédie Française, vi aŭdus la tumulton kaj la kriegadon proksimiĝantajn pli kaj pli, ĝis vi estus meze de densega amaso kaj senĉesa muĝo. La amaso elĝorgadis la nomon de iu homo; kaj se vi estus bonŝanca, aŭ sufiĉe vigla por grimpi stratlanternon, vi eble povus ekvidi la homon mem, dum lia kaleŝo malrapide moviĝis tra la maro da bruanta popolo. Eta maljuna viro, nekredeble malgrasa kaj velkinta, en ruĝa jako subŝtofitita per ermeno, kun vizaĝo duonkaŝita per

granda nigra peruko laŭstile de Ludoviko XIV. Nia propra Aŭstralia ŝtatviro, Sir Henry Parkes, kutimis sin amuzi, elpensante trafajn mokpriskribojn pri siaj oponantoj, dum ili paroladis. Unu el tiuj inspiraĵoj - de kiu la trafito neniam povis sin apartigi - estis: „velkinta tarantulo“. Per tiu ĉi oni povus doni iom tre bonan bildon ankaŭ de la vireto, se ni prave kredas al tiamaj pentristoj. Lia vizaĝo pensigis pri animita kadavro. Sed liaj okuloj brilis per tia eksterordinara lumo, kaj en lia rideto dancis ia petolanta malico. Li havis 84 jarojn, sed aspektis kvazaŭ la paso de l' tempo neniel forprenus de lia povo ironie ĝui la spektaklon de homa malsaĝeco.

Li naskiĝis en Parizo kaj estis Parizano ĝisoste; sed Parizo estis por li malagrabla patrinurbo. Jam du periodojn li trasidadis en la Bastilo - unu por dek unu monatoj - kaj pli ol unu fojon li estis ekzilita for de Francujo. (Li loĝis preskaŭ tri jarojn en Anglujo.) Ofte li devis kaŝi sin en la urbo kaj kelkfoje evitis malliberigon nur per fuĝo el ĝi. Li glitis en sennombrajn malfacilojn kaj faris nekalkuleblajn malamikojn inter la riĉaj kaj potencaj. La lastajn 27 jarojn li ne enpaŝis en sian naskurbon. Dum lia foresto, tiu loko jam vekiĝis ĝis sento de lia graveco. Oni jam ĝenerale konfesis lin la plej fama vivanta Franco, homo, pro kiu aliaj nacioj honoris Francujon. Li jam fariĝis kvazaŭ Eŭ-

ropa institucio. Al lia ekzilejo pie iradis pilgrimantoj, ĉiun tagon en la jaro, el ĉiu lando en Eŭropo.

Tiujn 27 jarojn loĝis ĉe Ferney, vilaĝeto sur la Franca flanko de la Svisa landlimo. Li posedis bienon ankaŭ sur la alia flanko de la limo. Liu plano estis, kiam li sukcesis piki la Francan registaron en danĝeran koleron, salteti en Svisujon, kaj kiam la Svisa registaro fariĝis minaca, reen salteti en Francujon. Evidente, estis nepre necese, ke li ne kverelu kun la du registaroj samtempe. Sed la Franca registaro ne grave agis kontraŭ li, kaj li komforte loĝis 27 jarojn ĉe Ferney, kie li sukcesis en rimarkinda afero, nome, teni tutan Eŭropon interensita en li, ĝis fine li akiris, laŭ frazo de unu sia biografiisto, „prestigon kaj influon, kiujn eble neniam posedis iu alia homo, kies potenco estis la nepalpebla potenco de la vortoj“. Ĉar tiu maljuna viroto kun la kadavra vizaĝo, brilaj okuloj kaj maltrankviliga rideto, dum tuta vivo estis batalanto, kaj lia nura atakilo estis la plumo.

Liaj kuracistoj informis lin, ke se li daŭrigus siajn nunajn vivkutimojn kaj regule prenus sian tason da kaĉo, ili promesus ankoraŭ dekon da vivjaroj; sed fariĝis nesulpremebla la deziro vidi Parizon ankoraŭ unu fojon, ricevi la omaĝon de tiu urbo, de kiu li tiom akre suferis. Li sciis la riskojn, sed li elektis la plenplanan honon de glora vivo. El siaj multaj vojaĝoj, li ekiris sur la lasta, kiu estis pli vere triumfa progresiro ol fariĝis al ajna alia literaturisto de post la mondkomenco. Oni sentas plezuron imagi, ke se Byron estus vivinta ankoraŭ 40 jarojn kaj tiam revenus al Londono, ankaŭ li vidus ĉirkaŭ si similan flamon de gloro. Sed pri tio ĉi ekzistas dubo. La Angla temperamento estas pli flegma ol la Franca. La Brita homamaso posedas, ĝis pli forta grado ol la Franca, la valoregan povon, teni sin ne tro ekscitita. Sed, aliflanke, ĝi ne estas tiom preta montri grandanimam entuziasmon. Krome, la Anglo ne tre ŝatas la literaturon.

La vojaĝo tra Francujo estis antaŭgusto de tio, kio devis esti lia en Parizo. La novaĵo pri lia veno antaŭkuris lin de urbo al urbo. Ĉe Bourg li devis kaŝi sin en ŝlosita ĉambro por eviti la tro febran amason. Ĉe Dijon, en la hotelo, kie li loĝis, junaj viroj subaĉetis la servistojn lasi ilin vesti sin kelnere, por ke ili havu eblon ekvidi la patriarkon de Ferney. Ĉe la pordoj de Parizo, kie lia kaleŝo devis halti por la dogana ekzameno, uuu el la soldatoj rekonis lin, kaj la malkovro flugekuris tra la urbo kiel fajra kruco (1).

Fine de marto li jam kelke da semajnoj loĝis en Parizo, kaj la tumulto kreskis, an-

stataŭ moderiĝi. La eklezia partio ne partoprenis, ĉar li estis ilia akra kontraŭanto; kaj Versailles grimacis malaprobhon, ĉar tiu viroto, malgraŭ lia amikeco kun du Eŭropaj monarĥoj, facile mokadis ĉian aŭtoritaton; sed la reĝaj princoj, motivitaj de scivolemo, iris en la ĉefurbon por rigardi la strangan spektaklon de tiom da spontanea entuziasmo, kaj eble demandis al si. Pri kio agas?

Ŝajnis, ke la amaso kunvenis ekster lia hotelo por nedefinite longa tempo.

En la granda tago, je la 4a posttagmezo, li veturis, tra huraantaj amasoj, al la ĉefkonstruo de la Akademie en la Cour du Louvre. Tiu respektinda korporacio... aŭ, pli ĝuste, ĉiu ĝia membro, kiu ne estis ankaŭ ekleziano... elvenis por saluti lin, honoron, kiun neniam antaŭe faris ili al alia vizitanto, eĉ ne al fremdaj monarĥoj. Ili proponis al li la prezidantan seĝon, kaj, kun ora ĝentileco, deklaris, ke ili neniel povus lasi lin suferi la lacigon de paroladfarado. Li tie sidis, dum d' Alembert, en ĉies nomo, faris al li omaĝon tiamaniere, ke la okuloj de la viroto perlis je larmoj.

Kiam la afero finiĝis, li veturis trastrate al la Comédie, kie teatraĵo, la lasta tragedio de li, devis prezentiĝi. Dum li eniris loĝion, ĉiu viro kaj virino en la teatro ekstaris kaj kriis lian nomon. Li penis kasiĝi malantaŭ unu sia kunulo, sed la vivuado daŭris ĝis li konsentis elpaŝi. Je tiu momento aktoro, enirinte la loĝion, metis laŭkrnonon sur lian kapon. „Ah! Dieu! Vous voulez donc me faire mourir à force de gloire!“ (Ah! Dio! vi volas do mortigi min per gloro!) li diris, kaj formetis la kronon. Je tio, Princo de Beauvau prenis la honorilon kaj ĝentile devigis lin denove ĝin surhavi. Sekvis kromordinara bruo, kiu daŭris pli ol du dek minutojn. Finfine la aktoroj povis komenci la ludon.

Legi tiun teatrolecon nun ne donas multe da plezuro, sed la tiama aŭdantaro estis en la ĝusta humoro aplaŭdi ĉiun linion; kaj ĉe kurtentfalo la huraoj surdigiis. Kiam denove levigis la kurteno, la statuo de la maljunulo, portita el la promensalono, staris meze en la scenejo. Vidante tion, la aŭdantoj preskaŭ deliris entuziasme; silento reigis nur kiam Mdle Vestris elpaŝis kaj deklamis kelke da linioj honore al la heroo; tiam ŝi metis laŭkrnonon sur la kapo de la statuo. Je tio la multaga viroto, kiu jam retiriĝis en la postan parton de la loĝio, stumbe venis antaŭen, liaj larmantaj okuloj fluis, li estis superfortita de prema emocio. Kia emocio, kiu diros? Ĉu li ĝuis ĝin tutan, aŭ ĉu li pensis amare, ke li donus ĉiome de tiu gloro kontraŭ unu juro de sia aventurriĉa juneco? Kiam ia ordo restariĝis, ili ludis komedion — unu lian — kun la kronita statuo ankoraŭ meze la sce-



nejon. Tiam, estis pli da ovacioj kaj alia triumfa procesio dum lia kaleŝo nerapide portis lin ree al lia hotelo; viroj grimpis sur radoj kaj piedbreto por ekhavi videton al li, eĉ por kisi liajn manojn. Fine atinginte sian loĝejon, li falsidiĝis kaj „ploris kiel infano“. precize du monatojn poste li estis morta.

Kion li estis farinta, tiu maljunulo, kiu jetis Parizon en tiom da frenezo de l' adoro? Skribis teatraĵojn? Kian efektive li ne skribis? Li skribis tragediojn kaj komediojn, kaj poezion de ĉia speco, de la epigramo ĝis la epopeo; kaj kvankam nenio el tio multe allogas nian guston hodiaŭ, ĝi nerezisteble plaĉis al la gusto de tiu tempo. Sed lia prozo ankoraŭ influas. Li verkis historiojn kaj biografiojn, traktatojn pri filozofio, eseojn kaj dialogojn, romanojn kaj pamfletojn — pri ĉia konceptebla temo; li estis la plej fama pamfletisto de sia tempo. Kaj malgraŭ ke multe da liaj verkaĵoj devis aperi, pro prudento, havante nenian nomon sur la titolpaĝo, ili tute ne povis esti prenitaj por la verko de alia, ĉar neniu alia povus sorĉi tian ĉampanan eferveskon en la stilon. Li estis mastro de ĉiaj formoj de l' spirito, de senhonta moko ĝis la plej delikata ironio. Lia menso estis la plej vigla, la plej vaste fluga, kaj piklerta de lia tempo. Sesdek jarojn li senlace laboregis per plumo; spite de sia facilŝanĝa temperamento li devigis sin al iu solida industrio, kiu estas unu el la mirindaĵoj de la literatura historio: foje ili havis submane ses verketaĵojn en sama tempo.

Kio estis unika pri li, tio estis lia intelekta energio, kaj la fakto, ke ĝis la lastaj semajnoj de lia vivo ĝi ŝajne neniam malfortiĝis. Li

faris multajn bedaŭrindegajn erarojn; li skribis kelkajn liniojn, pro kiuj ni preskaŭ povas malami lin. Tamen, superrigardante la vastan kolekton de liaj verkaĵoj kaj meditante pri tio, kiel ĉi viro formis kaj gvidis, bone-malhone, la destinon de Eŭropo, tiam ni sentas veni al ni io simila al respekto.

Kaj malgraŭ, ke al ni, Britoj, kun la flegmo de nia raso, la Franca frenezo de entuziasmo aspektas iel ridinda, ni devas vidi en ĝi ankaŭ ion grandan. Ne estas mirinde, ke Carlyle estis frapita de tiu io, kaj admiris la heroo-adoradon, eĉ se li ne tre admiris la heroon. Tiuj Francoj sentis, ke ili ŝuldas honoron al granda inteligento kaj granda plenumo; al tiu viro, kiu defiis la enfortikigitajn potencojn de la mondo kaj batalis kun neelĉerpebla kuraĝo en la afero de l' vero kaj justeco. Probable tro malmulte da ili vidis la tutan signifon de la evento, aŭ komprenis, ke ili estas foradiaŭantaj la malnovan sociordon kaj bonvenigantaj la Francan Revolucion, kiam en tiu teatro ili staris dum du dek minutoj, kriegante:

„VIVE VOLTAIRE!“

*Tradukis el la Angla R. Banham,  
Melbourne.*

(1) En Skotlando, en la pasinteco, flamanta kruco estis uzata kiel signalo por tempoj de militdanĝero. Iu rapidkurulo alarme portis ĝin tra la montoj kaj valoj, vokante al arm-havuloj pretigi sin por batalo. Vidu mencion pri ĝi ankaŭ en „The Lady of the Lake“, de Sir Walter Scott. *F. R. Banham.*

ALFRED KUŖNIEC.

### „IMPROMPTU“.

*Sur rusta tegmento kun fingroj - antenoj,*

*Rampas suno vakacinikolora.*

*Velkas ftiza ĝardeno senflora,*

*Mortanta senplende, pro urbaj venenoj.*

*Largā voj' en polvo malpure volvita,*

*Foren kurante, fajre spiregas.*

*Teron per mola brakumo tegas*

*Helblua ĉiel', unutone pentrita.*

*Fostoj solecaj, gardantoj de la strato,*

*Dratojn ardantajn forĵeti penas,*

*Laca ĉeval' survoje sin trenas,*

*Oscedas kuŝema, tiranta sin kato...*

## INFANO DE SALONO

(FRAGMENTO)

Patro! mi estis tiam tre malgranda, mi pensis, ke dio tre kolerus, se mi prenis kaŝe kukon - mi ŝatis skribaĉi per kraĵono kaj orde starigi dometojn el malnovaj kartoj, rigardi bildetojn, aŭskulti fablojn pri orfoj, duonpatrinoj kaj spiritoj - mi miradis, de kie ĉevaloj scias, kien la paĉjo ordonas iri al veturigisto kaj kiamaniere povas en ĉielo lokigi ĉiuj mortintoj. Mi ne volis trinki lakton kaj iri frue dormi - mi tre timis malhelan ĉambron kaj fremdulojn, ĉar vi diris al mi, ke oni ne devas proksimiĝi al fremdaj homoj, ĉar ili vendas infanojn al almozuloj kaj ĝenerale, ke oni ne devas preni de ili ion ajn, kaj ŝajnis al mi, ke post la muroj de nia hejmo ĉie atendas min ia malamika forto, ke krom vi, ĉiuj homoj estas malamikaj, dezirantaj perdigi min. Kiam la patrino donis al mi moneron, por ke mi donu ĝin al almozulo, alĵetante, ke li „nenion faros al mi“ mi timis kaj observis, ĉu la patrino ne foriros, ĉu ŝi ne lasos min sola, senkonsila. Vi diradis al mi: restu hejme, vi havas tiom da belaj ludiloj kaj tiom da bonhonoj, mi komencis plori - kaj vi ridis. Mi timis dion, vin, homojn, mi ĉiam nur timis, timis kaj malfidis. Vi eliris al teatro. Al la vartistino venis iu viro en altaj botoj - li sidis en kuirejo kun ĉapo sur la kapo. Mi komencis plori, ke tiu ĉi knabaĉo foriru.

La vartistino ordonis al mi peti lian pardonon kaj kisi lian manon. Mi ne volis - mi tremis. „Se vi tuj ne pardonpetos la sinjoron, mi malheligos la lanpon kaj foriros - vi restos sola - venos senkapa almozulo, ŝtopos al vi la buŝon, metos en sakon kaj ĵetos en riveron“. Vi alportis al mi el teatro ĉokoladaĵojn kaj skatoleton kun bildeto.

„Kial ĵanko ne dormas ĉu vi ne ploris, karulo? Vi havas tiajn ruĝajn okulojn - Ne, patrino? Kaj mi kisis ŝian okulon manon.“

Sekvan jaron mi ricevis pantalonon kaj francan infanistinin. En majo mi devis fari ekzamenon kaj iri lernejon. En tiu tempo mi opiniis, ke plej malkara magazeno estas senfina trezorejo, unu floren - riĉaĵo kaj mia nomtago - tutmonda festo. Mi revis pri ĉapo kun steleto, pri zono kun buko pri flanka poŝo ĉe bluzo, kiel havas plenaĝuloj. Mi kredis, ke dio kreis bestojn, por ke la homoj ilin manĝu kaj ke mulriĉaj infanoj estas malgentilaj. Ĝenerale mi tion kredis, kion diris paĉjo, patrino, instruisto kaj libroj kun bildetoj.

Ni loĝis tiam sur Novmonda strato - mi sidis sur kanapo kun la patro kaj legis fablon de Andersen pri patrino, kiu serĉis

sian mortintan infanon kaj kiu oferis siajn belegajn harojn, dentojn kaj okulojn por trovi vojon al morteco - al sia infano. Vi tiam laboradis ĉe via skribotablo. La servistino eniris, dirante ion al vi. Post unu momento ia mulriĉa virino eniris - ŝi genufalis, kisis viajn manojn kaj vin petegis pardoni ŝian edzon. Li vendis tiun ĉi tutan keston por du florenoj - tio estas vero - ia malbono tentis lin - li estas nek ŝtelisto, nek drinkulo li malfacile laboras - malbono lin nur tentis - du infanoj mortis al ili antaŭ kelkaj tagoj kaj la tria estas malsana. Vi tiam diris, ke vi povus jam nenion helpi, ke vi ne havas kompaton por ŝtelistoj. Elirante ŝi ĵetis sur min rigardon, anoncanta malfeliĉon. Mi tremis timigita. Tiam unuan fojon mia animo forsaltis de vi kun teruro. Ho! mi agus alie.

Tio estis tempo, kiam vi estis por mi ankoraŭ idealo: ĉio en vi imponis al mi: tio, ke vi havas harojn sur la mano, ke vi legas ĵurnalojn en lito, ke vi havas vizitkartojn, ke vi streĉas horloĝojn, ke kiam vi iras tra stratoj, tiom da homoj vin salutas, ke vi ricevas leterojn kun eksterlandaj markoj, ke vi portas nazumon, ne defalantan de nazo, ke vi fumas cigaredojn kaj ne ĉiam deprenas ĉapelon antaŭ preĝejo. Kiam ni komencis viziti lernejon, inponis al mi: antaŭe instruistoj, poste patro kaj duajaraj kolegoj, precipe el pli supera klaso, sciantaj lasi fumon el nazo, fine libroj kun romanoj. La instruisto estas supernatura kreaĵo. La signeto farita sur libro per lia mano - ĉio estis respektinda. Hejme mi imitis iliajn voĉojn, parolmanieron, gestojn. Mi kolektadis malnovajn monerojn kaj markojn, mi ĉiutage donadis unu bulkon el mia matenmanĝo al mulriĉa kolego, mi foje alportis malgrandan hundeton, al kiu patrino ordonis doni lakton kaj forigi. Mi kredis malsukcesajn tagojn kaj tion, ke eliro el hejmo per dekstra piedo alportas feliĉon aŭ malfeliĉon, mi ofte iradis kun kolegoj alrigardi kadavrojn en kapelo, mi legadis en ĵurnaloj ĉiujn terurajn historiojn pri krimoj kaj lunatikoj - kaj vespere mi kovradis kapon per litkovrilo - mi revis pri haseno kun fiŝetoj, limakoj kaj marplantoj - mi volis esti aktoro, poeto, preĝisto, vojaĝanto, advokato. Kaj antaŭ ĉio mi volis esti plenkreskulo - esti mi mem. Tiam mi estis jam tute fremda al vi, ho! mia patro. Foje mi intencis fari piedan ekskurson kune kun du miaj kolegoj, se en ekzamenoj ni sukcesos - kaj ni faris ilin tre bone vi permesis al mi fari tiun ĉi unutagan piedan ekskurson, sed sekvintan tagon vi ŝanĝis opinion -



vi malpermesis kaj mi ne povis eĉ sciigi la kolegojn. Post tagmanĝo vi proponis al mi promenon, sed mi obstinis, mi restis sola hejme „kun bedaŭro kaj senforta kolero en animo“. Tio estas nur malgrandaĵo! ĉu ne vere sed mi bone ĝin memoras.

Vi katenis miajn agojn, se miaj pensoj flugis libere, ĉar via prizorgo ne profundigis pli ol en buŝon, ĉu mi sufiĉe manĝis kaj en orelon, ĉu ĝi estas pura. Tiam mi jam ne solvadis ŝaradojn el ĵurnaloj - mi revis pri alia pli granda ĝloro.

— Jadvinjo, estu trankvila - ne malhelpu al Janko - li lernas“ diradis vi al mia fratino.

Kaj Janko sub la greka gramatika havis romanon, ruĝigojn sur vangoj, larmojn en okuloj kaj uraganon en la animo: entuziasmon, timon, doloron kaj konscienciproĉojn.

Venis neĝblanka amo instruinta senti kaj revii - mi loĝis kun ĝi en marlanterno kaj laboris pri fluganta maŝino aŭ perpetuum mobile. Mi skribis leterojn al famaj verkistoj - al Belmont „sinjoro, mi legis vian ĉefverkon „En la nerva jarcento“. Dio! kia granda verko ĝi estas“.

Sed mi ne forsendadis tiajn leterojn, mi timis, ke ili estas ridindaj, ke oni primokos ilin, kiel mokis min miaj plej proksimaj - mian kaŝitan amon, miajn revojn kaj dubojn.

Antaŭ preĝo mi ofte diradis: „Sinjoro nia, jen mi humile iras al vi peti plej grandan favoron: donu al mi eblecon de sincera kaj varnega preĝo - ho! instru min, sinjoro, preĝi al vi kun espero kaj kredo.

Mi ofte demandis min: de kie iras heredaĵ malsanoj? mia kolego kaj mi decidis studi en pastra seminaro: ni havos predikojn por prostituistinoj - ni kune ilin verkos. Niaj reformoj estus jenaj: pro delogo - mortpuno, malsanuloj ne rajtas edziĝi. Anstataŭ brando - kolekti monon por malriĉuloj, anstataŭ milito - grandaj laborejoj.

Mi instruis filon de nia domgardisto - la knabo estis kapabla - mi vidis en li estontan popolgloron - lecionoj daŭris du semajnojn. Jadvinjo havis kapdoloron. Kuracisto diris, ke tio estos morbito.

— Ĉu la knabo de domgardisto ne povis alporti infekton?

„Jes, li povis - la loĝejo de domgardisto estas sidejo de infekto por la tuta domo“.

— Ĉu vi aŭdas Janko, kion diras sinjoro doktoro?

Tiel finiĝis miaj lecionoj. Ĉu vi tion memoras? Ne?

El la pola lingvo tradukis  
Anna Weinstein.

## XXX-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

LONDON, 30 JULIO — 6 AŭGUSTO 1938.

Oficiala Informilo N-ro 6-7.

**Televido.** — Ni esperas aranĝi, ke la brita radio-aŭtoritato disvidigu per sia televidoservo ĉeestantojn en la Kongresa Balo. Oni do se eble kunportu naciajn kostumojn por tiu okazaĵo!

**Albumo.** — Ĉiu kongreso ricevas bildalbumon kun 70 belaj fotografaĵoj pri Londono. Ni esperas, ke tio estos interesa memoraĵo pri la Kongreso.

**Loĝejoj kaj Ekskursoj.** — Mendiloj estas jam senditaj al kongresanoj kaj pliaj ekzempleroj estas haveblaj ĉe la kongresoficejo. MENDOJN POR EKSKURSOJ NI POVOS AKCEPTI NUR ĜIS LA 11-A DE JUNIO.

**Kotizoj.** — La kongreskotizo estas £1-10-0. La edzo aŭ edzino de kongresano, kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj, pagas po 5 ŝil. Paĝiloj estu pageblaj al Internacia Esperanto-Ligo.

**Donacoj.** — La Komitato ankaŭ volonte ricevas donacojn al la kongresa kaso por helpi al plena sukceso de la Kongreso. Donacoj ĝis nun estis £21-12-6.

**Ekskursoj.** — Ni ĝojas sciigi, ke ni sukcesis ebligigi pli grandan partoprenon en la ekskursoj. Ni do povas akcepti aliĝojn ĝis

la mezo de la nuna monato. Ni forte instigas al partopreno en unu el ĉi tiuj ekskursoj, kiuj vere reprezentas bonegan valoron por la prezoj petitaj. Jen denove mallongaj detaloj pri la kvar ekskursoj, kiuj okazos merkredon la 3an de aŭgusto:

1. Al Stratford-on-Avon. Prezo, kun tagmanĝo kaj temanĝo: £ 1.
2. Al Hastings kaj Eastbourne. Prezo, kun tagmanĝo: 12½ ŝil.
3. Al Windsor kaj Hampton Court. Prezo, kun temanĝo: 10 ŝil.
4. Al Bestoparko Whipsnade. Prezo: 6 ŝil.

**Membraro.** — Ĝis hodiaŭ (15-6-38) aliĝis al la Kongreso 1379 el 28 landoj.

**Kongresa Libro.** — Tiun ni jam sendis al ĉiuj kongresanoj, kun la escepto de tiuj, kiuj laŭ nia scio estas jam survoje al Londono. Ni konsilas, ke ĉiu kongresano jam antaŭ la Kongreso zorge tralegu la kongresan libron.

**Postkongresa Libertempo en Hoddesdon.** — Ni ankoraŭ povas akcepti aliĝojn, kaj rekomendas fruan enskribon. La tuta

kosto por ĉi tiu unusemajna ripoza libertempo tuj post la Kongreso en granda gastodomo proksime al Londono estas nur £3<sup>1</sup>/<sub>2</sub>.

**Loĝejoj.** — Ni ne povas garantii loĝejon al iu kongresano, kiu ne sendas al ni mendilon antaŭ la mezo de la nuna monato.

**Balo.** — Ni esperas ke posedantoj de naciaj kostumoj nepre portos ilin por la Balo.

**Blindula Kaso.** — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por ebligi, ke blinduloj partoprenu la Kongreson. Jam ricevita £80-14-2.

**Presajoj.** — En la kongresejo kaj kongresaj kunvenoj oni rajtos disdoni cirkulerojn kaj ĉiajn aliajn presaĵojn nur post antaŭa aprobo de la kongresa komitato.

**Dokumentaro.** — La sama postulo rilatas al presaĵoj disdonotaj kun la oficialaj kongres-dokumentoj; tio estas ili devos ricevi

la antaŭan aprobon de la komitato kaj devos alveni ĉe adreso indikota, plej malfrue du semajnon antaŭ la kongreso.

**Adreso por leteroj.** — Sekretario, 30a Universala Kongreso de Esperanto, Herons-gate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

**Por la Organiza Komitato**  
**Cecil C. GOLDSMITH.**

**Sekretario.**

## KOMERCISTOJ.

Speciala kunveno por komercistoj Esperantistaj okazos la 4-an de aŭgusto, je la horo 14.30, en la Kongresejo. Oni pritraktos disvastigon de Esperanto en komercaj kaj industriaj rondoj: eksporto, importo, fabrikado, asekuro, transporto k. t. p. Interesatoj sendu aliĝon kaj proponojn al s-ro I. Alvarez, 80 Bishopsgate, London, E. C. 2.

## KOMUNIKO DE P. E. D.

Ni ricevis jenan alvokon:

**Al**

**Esperantaj Societoj, Esperantistoj  
en Polujo**

**Tre Estimata(j) Samideano(j):**

Estas konata fakto, ke radio plej bone povas servi por disvastiĝo de Esperanto. Dum la lasta tempo kun ĝojo oni povas konstati, ke multaj radiostacioj en la tuta mondo praktike uzas Esperanton dum la plej diversaj disaŭdigoj. Bedaŭrinde, nur la „Pola Radio“ malatentas la gravan signifon de Esperanto kaj eĉ ĉesigis disaŭdigi prelegojn en Esperanto pri Polujo, kiuj rikoltis grandan sukceson eksterlande.

Varsovia Esperantista Societo intencas prezenti al Direkcio de „Pola Radio“ konforman petskribon vaste dokumentitan pri apliko de Esperanto en radio, petante disaŭdigi en kaj pri Esperanto. Sed estas necesa forta subteno flanke de radioabonantoj kaj radioaŭskultantoj. Tial Varsovia Esperantista Societo presigis specialajn foliojn por kolekti la subskribojn.

Energie kaj zorge kolektu la subskribojn kaj la foliojn resendu al Varsovia Esperantista Societo, Warszawa, Leszno 56/9.

Memoru, ke nur de via bonvola subteno dependas la sukceso de nia agado!

Kun samideanaj salutoj!

*Estraro de Varsovia Esperantista Societo.*

Kolektu subskribojn inter viaj gekonatuloj dum via libertempo. Ekprofitu la unikan okazon! La foliojn Vi povas senpage ricevi ankaŭ ĉe Pollanda Esper. Delegitaro (P.E.D.), Kraków, Lubicz 34.

## „KVINMIL — FONDO“.

Pluaj pagoj por „Kvinmil-Fondo“:

Dro Józef Krenicki, Warszawa	5—	zl
Emil Kołodziej, Chorzów	3—	„
Vilna Esper. Societo, Wilno	3—	„
Julia Neuberg, Kraków	2—	„
Wincenty Zięba, Łasica	2—	„
S. Szyk, Wilno	2—	„
Józef Toczyski, Lwów	2—	„
Bronisław Tuszkiewicz, Lwów	2—	„
Dr Bund, Lwów	2—	„
J. Szapiro, Białystok	2—	„
Ad. Oberrotman, Warszawa	2—	„
I. Lejzerowicz, Łódź	2—	„
Jan Mazurkiewicz, Pruszcz-Bagie nica	1—	„
Dro I. Fels, Lwów	1—	„
Regina Fels	1—	„
Dro R. Brandler	1—	zl
Minuška Mantel	1—	„
F-ino I. Reich	1—	„
Mgr Kleinowa	1—	„
Mgr N. Herr	1—	„
R. Nussenbaumowa	1—	„
S-ino Wojakowska	1—	„
F-ino K. Blank	1—	„
A. Ciechanowski, Białystok	1—	„
R. Tanchelewicz	1—	„
Zakrzewska	1—	„
E. Jabłoński	1—	„
Kop	1—	„
Szluchter	0:50	„
A. Jelin	0:50	„
F-ino E. Pomeranc	0:50	„
Firman	0:50	„



## AVIZO!

Interesatoj estas sciigataj, ke oni povas aliĝi al Internacia Esperanto Ligo ekde 1 de julio pagante jenajn kotizojn: Membro Abonanto (kun monata organo) — 8 zl 75 gr kaj Membro Abonanta Heroldon (kun se-

majna organo — 15 zl, Kotizo de Membro kun Jarlibro restas senŝanĝe 5 zl. Tutjaraj kotizoj estas MA — 22 zl 50 gr. MAH — 25 zl.

ing. M. Chmieliński  
ĉefdelegito de IEL  
(Toruń, Krasińskiego 4).

## RADIO.

Per radio Esperanto eniras sur kampon vere praktikan! Subtenu la E. dissendojn!  
Skribu al la Stacioj!

### REGULAJ ĈIUSEM AJNAJ DISSENDOJ.

#### PROGRAMO DUM JULIO

La horoj estas indikitaj laŭ mezeŭropa tempo.

#### Dimanĉe:

9:10—9:25 Kortrijk (204 m) Esperanta kroniko de G. Dehrouwere.  
19:00—19:30 Reykiavik (1442 m) Esperanto-kurso.  
22:30—22:45 PRC 7. Mineira (960 m) Momento de Esperanto.

#### Lunde:

18:45—19:00 Montpellier - Languedoc (224 m) Kroniko de A. Capoulade.  
20:00—21:00 JV 2 RL Caracas (51 m 72) Parolado.  
22:10—22:25 Roma II. (245 m) — 2RO (31 m 13) eble (25 m 4) Radio-ĵurnalo.  
22:45—23:30 Paris PTT (431 m) E. teatraĵo laŭ enondigo de Marc Darnault.

#### Marde:

18:00—18:15 M. Ostrava (269 m) Parolado (preciza programo nericevita).  
21:20—21:35 Kaunas (1935 m) Klaipėda (Memel 531 m) Lyiae (35 m) „Nia anguleto“.  
22:00—22:10 Turi (410 m) Tartu (579 m) Tallin (229 m) E. kroniko.  
22:25—22:40 PRF 3 Sao Paulo (960 m) Informoj kaj kurso.  
23:30—23:45 PRF 5 (31 m 58) — PRF 2

(780 m) Rio de Janeiro. Oficialaj inf. kaj kantoj dum la „Horo de Brazilo“.

#### Merkrede:

2:45—3:45 XECR (50:17 m) Mexico — Informoj.  
14:00—14:20 Paris PTT (431 m) — E. kurso de C. Rousseau.  
21:00—21:20 LTI Radio del Litoral. Rosario — E. kroniko.

#### Vendrede:

2:45—3:45 XECR (50:17 m) Mexico — E. kroniko.

#### Sabate:

10:30—11:— 7 HO HOBART — E. kroniko.  
13:45—14:00 Lille (247 m) — E. kroniko kaj kurso de R. Curnelle kaj F. ino Andre.  
16:15—16:30 Lokshergen - Limburg (202 m) — E. Kvaronhoro.  
19:00—19:20 Roma (1420 m) — 2 RO (25:4 m) — Turisma propagando.  
22:25—22:40 PRF 3 Sao Paulo (960 m) — Informoj, kantoj kaj kurso.  
0:30—1:— (sabatnokte) Barcelona (377 m) k. (42 m) — pri Hispanujo.

## KATOLIKA ESPERANTO MOVADO.

### XX-a I. K. U. E. JUBILEA KONGRESO

okazos en Ljubljana la 6-11 de aŭgusto 1938.

Leteradreso: Damjan Vahen, sekretario, Ljubljana, Reslova 29 (Jugoslavio).

Ĉiuj, kiuj deziras loĝi en hoteloj dum „Nia XX-a“ aŭ private, bonvolu plej baldaŭ sciigi detale la L. K. K. sekretariojn, ĉar alie la L. K. K. ne povas garantii tranoktejojn al partoprenantoj.

La kongresaranĝoj komenciĝos jam sabate, 6. VIII. antaŭtagmeze: je la 10-a horo en pavilono de Jakopiĉ: *Malfermo de Ekspozicio de Slovena Arto*; je la 11-a horo: *Malfermo de Filatelista Ekspozicio* kaj PM-foiro

en salono de hotelo „Metropol“: je la 15-a horo: *Malfermo de Fremdultrafika Ekspozicio* kaj *Ekspozicio de gazetaro*.

— Partoprenu ankaŭ la nomitajn malfermojn de la ekspozicioj!

Helpu per frua aliĝo al L. K. K. de „Nia XX-a“ kaj pagu plej baldaŭ kongreskotizon, ĉar L. K. K. troviĝas en embaraso. Ne forgesu: „Nia XX-a“ estu vere jubilea!

Ciu, kiu deziras posedi valoran, belan, riĉe ilustritan *Kongreslibron*, kiu enhavas krom la jam menciitaj 2 trikolorajn bildojn ankoraŭ 1 trikoloran „*Bled*“ kaj 1 trikoloran reprodukitan pentraĵon de *Grohar: Semisto*... Ciu, kiu aliĝas kaj pagas la kotizon (Din 50'—) ĝis la 10-a de julio trovos sian nomon kaj adreson en tiu kongreslibro.

Ne forgesu! *Artekspozicio* okazos de 6.—16. VIII. dum „Nia XX-a“! *Konstanta Enirbileto*, per kiu rajtas ĉiu posedanto kunlabori ĉe lotumado, kostas nur Din 10'—, por enkrilandado 4 resp. kup., se ni sendas enirbileton eksterlanden.

Ciu aliĝinto ricevos post 10. VI. *Kongreskarton!*

Sciigu plej baldaŭ viajn apartajn dezirojn!

## KARAJ GESAMIDEANOJ.

Kiel propagandisto mi alvokas vin aliĝi al la Pollanda Katolika Ligo Esperantista. Ne timu, ke oni devas tuj fariĝi devoto. Ne

kredu tion. Vi nenion perdos aliĝante al PKIE, kontraŭe, vi gajnos, ĉar por la kotizo jara 6'40 zl vi ricevos unue belegan, riĉan havan ilustritan monatan revuon *Espero Katolika*, due jarlibron de IKUE kun adresaro, trie vi rajtas unufoje anonci sin en revuo per malgranda anonceto ĝis 20 vortoj, se vi havas ion por vendi, aŭ vi deziras ion aĉeti, interŝanĝi, se vi volas edz- aŭ edziĝi ktp. kvare, vi ĉiumonate ricevos sciigon per cirkulero pri la movado en nia lando, kvine... tion mi ankoraŭ ne malkovras! Sed mi havas ideon, bonan ideon, per kiu ĉiu novaliĝanto multe profitos. Do aliĝu tuj! Hodiaŭ ankoraŭ! Adresu: M. Janik, Świerklany pow. Rybnik, Śląsk. PKO 303.779 Katowice.

## AL LA SUPERSILESIA ESPERANTISTARO KATOLIKA.

Pollanda Katolika Ligo Esperantista okazis sian unuan ĝeneralan kunvenon en Katowice la 5 - 6-an de julio ĉijare. La organiza komitato dissendis al la supersileziaj esperantistoj preskaŭ cent invitilojn, prela esperantistaron pri la dato kaj loko de la al la organiza komitato, kial oni ne sciigis Esperantistoj. Dum la kunveno oni riproĉis nante la adresojn de la adreslibro de Polaj kunveno. Do la organiza komitato petas ĉiun supersilesian esperantiston, kiu ne ricevis la inviton sciigi tion al mi ehle plej baldaŭ.

M. Janik, Świerklany pow. Rybnik.

# NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO.

## ESPERANTA PROSPEKTO PRI ESTONA BANLOKO.

Antaŭ kelkaj jaroj la plej populara kaj ŝatata estona banloko Pärnu eldonis *Esp-an* prospekton, kiu dum mallonga tempo elĉerpiĝis. Instigite de tio, la urba estraro aperigis ĵus la 2-an eldonon de tiu ilustrita prospekto, kiun ĝi senpage sendos al ĉiu petanto (adreso: Baninspektoro, Pärnu, Estonio). Montru, ke la ĉarma Pärnu, kie en la hanfako ĵus ekoficis ankaŭ nia s-ano Seppik, ne vane favoras Esperanton!

## EKSKURSOJ AL LA NORDO.

Kunlabore kun la estona *Esp. Turista Komisiono* la ĉeĥoslovaka *Esp.-Asocio* aranĝos dum la somero plurajn malkarajn ekskursojn el Mez-Eŭropo al la nordaj landoj, ĉiuj tra Varsovio. Tial ankaŭ por la poloj estus favora okazo partopreni ilin. Ĝis nun krom la grupvojaĝo al la granda estona kantfestoj en

la fino de junio estas certa jena ekskurso al kiuj aliĝis jam sufiĉe da partoprenanto: el Ĉeĥoslovakio:

1) **Estonio - Stokholm - Helsinko**. Forveturo el Varsovio (kun halto en Wilno) la 15 aŭg. je la 10'30, reveno al Varsovio la 30 aŭg. je la 21'38 Prezo: zl 328'—.

La prezoj enhavas ĉion: vojaĝo, loĝo, manĝo, vindandaj, pakaj transporto, gvidado, dormvagonoj, trinkmono ktp. Ĉiuj klarigoj okazos *Esp-e*, sed partopreni povos ankaŭ neesperantistoj. Oni povas partopreni ankaŭ **parton** de la vojaĝo, ekz. de Turmont ĝis Stokholm, kiam la prezo kompreneble konforme al tio reduktiĝas. Detalajn informojn donas kaj aliĝojn akceptas J. Friedrich, Jarna 13, Košice, Ĉeĥoslovakio, kaj H. Seppik, Strandhotelo, Pärnu, Estonio.

## GRANDAJ FESTOJ EN ESTONIO.

La 23-an kaj 24-an de junio okazis en la estona ĉefurbo Tallinn la 11-a tutlanda kant-



festo, al kiu kolektiĝis ĉirkaŭ 20.000 gekantistoj kaj muzikistoj el la tuta Estonio, el pluraj najbaraj landoj kaj eĉ el Ameriko. La kantfesto estis malfermata per grandioza procesio de la kant- kaj muzikhoroj, ĉiuj en naciaj kostumoj de sia hejmloko. Poste okazis dum du tagoj subĉielaj koncertoj de 15.000 persona unuigita kankthoro, giganta orkestro kaj ankaŭ solkoncertoj de pluraj elektitaj kankthoroj el en- kaj eksterlando (Finlando, Svedujo, Norvegio, Latvio, Danujo kaj amerikaj estonoj).

Speciale solenan karakteron donis al la ĉi-foja kantfesto la samtempa celebrado de la 20-jara jubileo de la estona respubliko. Tiukaze, en la kadro de la tiel nomata „venkofesto“, okazos la plej milita parado en la estona historio, granda nokta popolfesto kun „venkofajroj“ ktp.

Same kiel dum la 10-a kantfesto antaŭ 5 jaroj, ankaŭ ĉi-foje Esperanto ludis sufiĉe gravan rolon en la interrilatoj kun la eksterlandanoj, paralele kun la sveda, finna, germana kaj angla lingvoj; en ĉiuj elpendaĵoj troviĝis ankaŭ Esperanta teksto, en la inform-oficejo deĵoris Espe-e parolanta oficisto, ktp. Por propagando de la kantfesto la Estona Kantista Ligo eldonis antaŭ nelonge belan ilustritan prospekton en Esperanto, senpage riceveblan de Eesti Lauljate Liit, Tallinn, Estonio.

*H. Seppik.*

## INTERNACIA JUNULARKUNVENO EN GROET (NEDERLANDO).

Ĝis nun anoncis sin por la kunveno jam pli ol 100 infanoj el: Francujo, Anglujo, Kimrujo, Polujo, Belgujo.

La kunveno daŭros unu semajnon (10-17 aŭgusto). La kostoj estas: Por nederlandanoj: 7,50 guld, por eksterlandanoj: 3,50 guld (enkalkulite la ekskursoj). Nur infanoj, kiuj sufiĉe bone parolas esperanton rajtas partopreni. Informoj:

„La Juna Vivo“ West-Grafdijk Nederlando.

## LA ESPERANTO-DOMO EN ARNHEM

kore invitas ĉiujn geesperantistojn al somera libertempado kaj speciale al partopreno en la kursoj kaj aliaj aranĝoj.

La Esperanto-Domo estas ideala renkontejo kaj libertempejo de ĉiulandaj geesperantistoj. Ĝi kuŝas en belega parko, kaj ĝia hotelo por 50 gastoj estas instalita kun ĉiu moderna komforto (fluanta akvo, centra hejto, varma akvo, leg- kaj skribsalono, biblioteko, ĉiuspecaj societaj ludiloj, fortepiano, bonega kuirejo k. t. p.).

En la Esperanto-Domo estas aranĝataj studaj kaj amuzaj kunvenoj, kaj agrablaj ekskursoj al la belega ĉirkaŭaĵo de Arnhem.

**Prezoj:** Ĉambro kun matenmango: 2.50, 2.25 aŭ 2.— guld.; pensio (ĉambro kaj la tri manĝoj): 3.50. 3.— aŭ 2.50 guld., laŭ la rango de la ĉambro (unu lita, 2-4 lita, 5-aŭ pli-lita). Apartaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj laŭ tarifo. Servmono 10%. En la komunaj ĉambroj la litoj estas apartigitaj per kurtenoj. Ĉe longdaŭra restado kaj por infanoj pli malaltaj prezoj.

**Adreso: ESPERANTO-DOMO Arnhem.** (Esperanto-laan 3).

**Adreso** por aliĝoj kaj informpetoj: *Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando.*

## GRATULOJ.

Al F-ino Ellen Isbrücker kaj s-ro Walther H. Stein kore bondeziras pro ĝefianĉiĝo.

*Prof. Dr O. Bujwid.*

F-ino Eleonora Kardasiewicz kaj s-ro Ludwik Stalewski ĝeedziĝis en Siedlce. Ni sendas al la feliĉa juna paro korajn gratulojn.

*Pola Esperantisto.*

## RESPONDOJ DE LA REDAKCIO.

**S-ro C. C. Ramazzano, Italia.** En la sendita de vi traduko de „La versaĵo de la tomboj“ ni trovis, bedaŭrinde, tro multe da ne klaraj esprimoj, kies sencon ni ne povas kompreni kaj pro tio la versaĵon enpresigi.

**S-ro M. F., Tarnów.** Koncerne la tradukon s. t. „La besto en arto kaj artmetio“ ni estas devigitaj respondi al vi kiel ĉi rure. Se ni havus almenaŭ la originalon verkitan en lingvo por ni komprenebla, ni klopodus la tekston glatigi.

**MEMORFORTIGO** per diverslingvaj perkorespondaj lecionoj. Postulu senpage prospektojn laŭ adreso:

**MNEMONIKA INSTITUTO de Dro D. Fajŝtejn, Wilno, Zawalna 15.**

Kun bedaŭro ni sciigas, ke la 1-an de junio 1938 la morto forprenis el niaj vicoj samideanon-veteranon HNAT JAKIMČUK el Lvovo. La mortinto estis fervora esperantisto, kiu ĉiam forte kredis je la venko de Esperanto. Li estis aktiva membro de Ukraina Esperanto-Societo en Lvovo.

*La estraro.*

**Uzu poŝtkartojn kun esper. teksto!**

Poŝtkarto — Monumento de Zamenhof 0:30 zł  
 — Tombo de Zamenhof 0:25 „  
 Poŝtkartoj ilustr. de Kraków; serio 0:80 „  
 por poŝtelspezoj aldonu 0:10 „  
 Poŝtkartoj — Zamenhofa naskodomo  
 en Białystok; lignogravuro  
 de Cz. Sadowski 5 pecoj  
 kun afranko 0:60 „

**Haveblaj ĉe „Pola Esper.“ Lubicz 34, Kraków. Konto PKO 406.660.**

Ĉiu leganto kaj abonanto de „Pola Esperantisto“ memoru pri propagando de Esperanto kaj de nia revuo inter siaj gekonatuloj dum la libertempo. La administracio petas sciigi ĝin pri la adresoj de simpatianoj (speciale de tiuj, kiuj nun libertempas en multaj banlokoj, vilaĝoj ktp. do havas sufiĉe da tempo por trankvile trastudi la revuon!), por sendi al ili la provnumeron de „Pola Esperantisto“. Varbu novajn abonantojn! Vi ricevos premion! Petu ankaŭ la katalogon de libroj riceveblaj ĉe admin. de „Pola Esperantisto“.

**UWAGA!**

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto“ skutecznie można na konto PKO. Nr 406.660 lub **przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr 29**, co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

**BONEGA PROPAGANDILO!**

Brazilaj poŝtmarkoj kun esp. teksto de IX Intern. Specimena Foiro kaj IX Brazila Kongr. de Esperanto haveblaj ĉe admin. de „Pola Esperantisto“ po 20 gr por peco. Aldonu 25 gr por poŝtelspezoj. Ni akceptas ankaŭ neuzitajn poŝtmarkojn kiel pagon.

LA POSTFERIA N-O DE „POLA ES-  
 PERANTISTO“ APEROS KOMENCE DE  
 SEPTEMBRO.

**LA NOVA pro LINGVA REVUO**

Sendependa ĵurnalo pri ĉia Esperanta presajo

**Direktoro: Corrado Cerri**

Ideala gazeto, absolute sendependa de ia ajn intereso, ĉu materiala, ĉu eldonista, ĉu verkista — Vera amiko de ĉiu subtenanto kaj disvastiganto de la lingvo Esperanto sendepende de sektaj bataloj — 4/12 paĝa — formato cm 35x25, Spegulo de nia literaturo Kunlaboras multaj lertuloj — NECESEGA AL ĈIUJ GRUPOJ KAJ AL ĈIUJ INSTRUISTOJ

**Petu provekzempleron!!!**

sendante fermitan leteron, enhavantan unu poŝtrespondkuponon internacian. Prefere sendu rekomenditan leteron!

**Vi fariĝos tuj nia diligenta leganto kaj abonanto!**

Ne prokrastu vian peton! Skribu hodiaŭ al CORRADO CERRI Instruisto - RAMAZZANO (Italujo-Perugio)

**G R A V A A V I Z O!**

Reprezentanto de la dumonata, 24-paĝa, ilustrita „SCIENCA GAZETO“ estas por Polujo la administracio de Pola Esperantisto. Abonprezo jara (por Polujo malaltigita) 4 zł, pagata je konto de „Pola Esperantisto“, konto P. K. O. Nr. 406.660. Abonante nun, vi ricevas ĉiujn numerojn de post januaro k. j. Ĉiu klera homo, por kiu ne estas indiferentaj la plej novaj sciencaj temoj — devas nepre aboni la revuon!

Ĉe pagoj rimarkigu ĉiam la celon!

ABONO: jare zł 8.—, duonjare zł 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł 6.—. Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł 0:70, duobla zł 1:40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł 30.—, 1/4 paĝo zł 15.—, 1/8 paĝo zł 10.—. Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł 1.—.

PRENUMERATA: rocznie zł 8.—, półrocznie zł 4.—. Dla Towarzystw i grup esperanckich rocznie zł 6.—. Zagranicą: 7 fr. szw. Numer pojedynczy zł 0:70, podwójny zł 1:40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł 30.—, 1/4 strony zł 15.—, 1/8 strony zł 10.—. Korespondencja: małe ogłoszenia z 10 słów (prócz adresu) zł 1.—.

Przekaz rozrachunkowy: kartoteka Nr 29, Kraków 2. — Konto P. K. O. Nr 406.660.

**REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.**